N I A V O Ĉ O
Madrida Esperanto-Liceo
San Alejandro 6-4°B-Ext. 28005 Madrid
(Nur poŝta adreso)
Ni kunvenas lunde je la 18,30 en Rodríguez San Pedro 13-3º-7

Redaktas kaj eraras: Lupe Sanz **MARTO 2006**

65 A HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

Finfine la kongreso okazos en la bela kaj historia vilaĝo El Puig (10 km de Valencio). Ĝi okazos inter la 21a kaj 25a de julio 2006. La lastan tagon okazos tuttaga vizito al Valencio.
En http://www.esperanto-es.net/congreso 2006 vi trovos informojn pri kotizoj, aliĝilon kaj mendilon por hoteloj. Jen la aliĝ-prezoj (en eŭroj):

Kategorio	Ĝis la 31 a de majo	Ekde la 1 a de junio
HEF-ano	25	33
Ne HEF-ano	30	38
Juna HEF-ano	18	24
Juna ne HEF-ano	22	28

Pagmaniero : Bancaja. C/ Málaga 37 , 46009 Valencia. Konto: 2077-0069-24-3100702329
Kunsendu la pagpruvilon kaj la aliĝilon al la adreso: Augusto Casquero de la Cruz. Avenida Burjasot 29, A-31. 46009 Valencia. Rete: augustocasquero@hotmail.com

E-KURSO EN INTERRETO

Hispanlingva versio de la dek-leciona kurso pri Esperanto estas trovebla en la paĝoj de AEL. Ĝi estas simpla kaj facile sekvebla :
http://esperanto.org.ar/curso_por_email/

TRA LA MONDO

La **Esperanto Muzeo de Vieno** translokiĝis al Palaco Mollard en kiu ekloĝis kvar sekcioj de la Aŭstria Nacia Biblioteko, kiu investis kelkcentmil eŭrojn por doni al al Esperantomuzeo kaj la Kolekto por Planlingvoj tute modernan hejmon.

Unuafoje en la historio de PEN Internacia la mondkongreso okazos en Berlino, fine de majo 2006. Giorgio Silfer, vicprezidanto de la **Esperanta PEN**, reprezentos la esperanto-literaturon kiel oficiala delegito.

Jen la blogo (Bitakoro) de **Grupo Esperanto de Valencia**. Ni klopodos meti en ĝin sufiĉe da informoj kaj artikoloj. Momente estas nur la komenco: http://valenciaesperanto.blogspot.com/

Kvin poeziaj libroj kandidatas por la premio Libro de la Jaro-2005, unu el ili estas "Celakantoj" de **Jorge Camacho** (eld. Bero, 2005), Por esti en la listo, la koncerna libro devus ricevi la subtenon de almenaŭ tri membroj de la Esperanta PEN-Centro. Ĝis 30 aprilo 2006 la abonantoj de revuo "Literatura Foiro" voĉdonos por la preferata(j) titolo(j).

Korea Eldonkulturo Asocio kaj Korea Eldonkulturo-Evoluiga Fondaĵo elektis, kune kun aliaj 32 libroj, la korean eldonon de “La homo kiu defiis Babelon” kiel rekomendinda libro al junuloj por 2005. La Biografio de Zamenhof estis tradukita al la korea lingvo de Korea Esperanto-Asocio kaj eldonita en oktobro 2005 de Hankuk-Universitato de Fremdaj Studoj. La elekto signifas ke la libro povas havi sur sia kovrilo la markon de rekomendinda libro, kaj ĉiuj universitataj kaj publikaj bibliotekoj devas ĝin aĉeti.

“El hombre que desafió a Babel”

La libro kiun ĉiuj esperantistoj devas legi

Hispana versio de la biografio de Zamenhof verkita de Masson/Centassi, tradukita far membroj de Madrida Esperanto-Liceo. Prezo 20 eŭroj.

Malgraŭ la plialtiĝo de la poŝto en 2006, Madrida Esperanto-Liceo decidis plilongigi la oferton ĝis la Hispana Kongreso:

po 23 eŭroj vi ricevos **“El hombre que desafió a Babel”** kaj **“Nuevo Método de Esperanto”**de Fernando de Diego. La prezo inkludas sendokoston al Hispanio.

Antaŭpago necese al la konto je la nomo de Madrida Esperanto Liceo ĉe
Banco Sabadell/Atlántico numero 0081/7110/98/0001266730

KONGRESOJ KAJ RENKONTIĜOJ

Atlantika Plonĝado. 3a ĝis 5a marto 2006 en Areia Branca (Portugalio)
65 a Hispana Kongreso de Esperanto. 21a ĝis 25a julio. El Puig (Valencia)

ESPERANTO EN AMASMEDIOJ

Kurioza mencio al Esperanto: ghi estas nomo de entrepreno produktanta filmojn: http://www2.eluniversal.com.mx/pls/impreso/noticia.html?id_nota=67956&tabla=espectaculos
Temas pri mencio de venonta filmo de Guillermo del Toro, "El laberinto del fauno", kun Maribel Verdú kaj Sergi López, en kiu unu el la firmaoj ghin produktantaj estas **"Esperanto Filmoj"** (tiele!): "Alfonso Cuarón, productor del filme de 17.8 millones de dólares, junto con Frida Torresblanco (ambos por Esperanto Filmoj)"

En la eldonoj de 25-01-2006 de la du ĵurnaloj de Ciudad Real, "**La Tribuna**" kaj "**Lanza**", aperas novaĵo pri la donaco de du ekzempleroj de **"Don Kiĥoto"** en Esperanto al la Biblioteko de la Universitato de Kastilio-La Manĉo kaj al la Muzeo de Don Kiĥoto en tiu urbo, fare de Fundación Esperanto. La transdonon de la ekzempleroj faris nia samideano Raúl Martínez.

En la senpaga ĵurnalo **"Metro Directo"** aperis Carmen Suárez kiel sekretariino de HEF kaj en la sekcio ¿y vosotros quiénes sois? Ankaŭ aperis mallonga noto pri HEF.

HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

La Sekretariino, Carmen Suárez, deĵoras lunde vespere (17,00-20,30h), dum aliaj tagoj vi povas faksi au telefoni al 91 446 80 79 (aŭtomata respondilo) au kontakti rete: admin@esperanto.es
JAM FUNKCIAS LA NOVA @-ADRESO DE HEF: admin@esperanto.es kaj www.esperanto.es

VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO

Konversacia-rondoj okazas ĉiulunde, ekde la 18.30 h, en RODRÍGUEZ SAN PEDRO 13-3º-7 . Tel. 91 446 80 79.

27-an marto	19,00h	"Vjetnamio: la Mekona delto". Lumbildoj

ESPERANTA BANKEDO
22-a de aprilo, je la 14,00.
Restaurante Candilejas, c/Candilejas, 32 (Vallecas, proksime de la Madrida Parlamentejo).
Pago: 29 eŭrojn (surloke)
Transporto: RENFE (Asamblea de Madrid – Entrevías). Aŭtobusoj: 57, 136 (haltejo Eroski). Metroo: Portazgo (10-15 minutojn piede)
Konfirmi antaŭ la 3 a de aprilo al Pedro Hernández: 912 23 48 53, 667 721 951; esperanto@mi.madritel.es

LA LINGVO DUM LA BANKEDO ESTOS ESPERANTO, DO, SPERTAJ ESPERANTISTOJ BONVOLU NE KROKODILI INTER VI. UNU EL LA CELOJ DE LA BANKEDO ESTAS, KE GELERNANTOJ ĜUU LA ETOSON KAJ EKPAROLU. TAMEN, KOMENCANTOJ KAJ NE ESPERANTISTOJ ESTAS BONVENAJ

ESPERANTO LICEO DE MADRID
Asociación de Utilidad Pública Municipal
San Alejandro 6- 4ºB EXT
28005 Madrid

ESPERANTO LICEO DE MADRID
Asociación de Utilidad Pública Municipal
San Alejandro 6- 4ºB EXT
28005 Madrid